# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:34; septembro 9.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: UMEA 234 KB. Sume 534 KB


## Naŭkapa estraro por ILEI

La nova estraro de ILEI restas preskaŭ senŝanĝa. Aldoniĝis nur unu plia estrarano, sed strategie grava estas la novulo: Aime Patrick Maniraiza, el Buĵumburo, Burundo, ***Opinio SMG:*** Laŭdinde, ke restas la cetera estraro, ĉar tiu kohera teamo en mia humila opinio, tre efike kunlaboris, sed tre bonas la aldono de afrika membro. Mi kaj la EKO-komunikoj varme bonvenigas la naŭan estraranon al la instruista ligo. Iam naŭpersona estraro estis apenaŭ permesebla pro la neceso meti estararanojn en aviadilojn por fizike kunsidi, kun altaj kostoj (financaj kaj klimatsave). Nun kun la reto, komunikado facilas kaj naŭpersonaj estraro tute defendeblas.



## *La Ondo* ondas kaj tutmondas

*La Ondo de Esperanto* ĵus publikigis artikolon de Jukka Pietiläinen pri la 109=a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Aruŝo, Tanzanio. Ĉi tiun ampleksan artikolon garnas kelkaj fotoj de John Huang. Legu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2024/08/afriko-47/

Legu en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* respondojn de Eŭropaj politikistoj, interalie, de la prezidanto de Eŭropa Komisiono Ursula von der Leyen, al Etsuo Miyoshi, kiu leteris al pluraj parlamentanoj — https://sezonoj.ru/2024/08/europo-5/

*Eŭropaj komencOntoj* estas titolo de la malfermita letero de Renato Corsetti al la landaj asocioj en Eŭropo, en kiu li konigas provon varbi junulojn por Esperanto en Italio. Legu ĝin en *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2024/08/corsetti-6/

## Nova interkonsento kun la hispana ministerio de kulturo

Hispana Esperanto-Federacio kaj la Ministerio pri Kulturo subskribis novan interkonsenton por reguligi la provizadon de metadatumoj kaj bildetoj en la Bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio al la Ministerio kaj, pere de tiu ĉi lasta, al la eŭropa retarkivo Europeana. La interkonsento estas publikigita en la Oficiala Ŝtata Bulteno (*Boletín Oficial del Estado,* BOE). Kaj BOE kaj ni ricevis la konsenton de la Ministerio publikigi ĝin ankaŭ en Bitoteko. En ambaŭ lokoj vi povas legi la kompletan tekston.

## Pliaj kursoj en Francio kaj Belgio

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Kurso de la 60-a domo en Lillo
Gvidantonomo: Viktoro Simonnet (ankaŭ la aldoninto)
Loko: Lillo, Francio. Vi trovos ĝin rekte en la paĝo:
https://edukado.net/kursejo?kid=27650

===

Nomo: Ni komencu
Gvidantonomo: Alain DROYER (kaj aldoninto)
Loko: Metabrief, Francio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27647

===

Nomo: Porkomencanta kurso de Esperanto
Gvidantonomo: Fransuaz Pellegrin. Aldoninto: Nikolao
Loko: Bruselo (St-Gilles - St-Gillis), Belgio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27651
Nomo: Porkomencanta kurso de Esperanto (Sesio 2)
Pliaj informoj kiel supre. Vi trovos ĝin ĉe: https://edukado.net/kursejo?kid=27652

## Niaj medicinistoj kuracas la mondon

UMEA estis sukcese reprezentita dum la 109-a UK en Tanzanio de d-ro Keyhan Sayadpour Zanjani, nia Landa Delegito de Irano. Aliĝis pro tio nova membro flegisto el Burundo. Antaŭ unu jaro, la 1-an de septembro 2023, forpasinta Honora Prezidanto, d-ro Imre Ferenczy, ankaŭ la Honora Membro de la UEA, estis en Aruŝo honorigita tiamaniere, ke oni nomis salonon de la kongresejo laŭ li. La bulteno de UMEA estas alkroĉita (234 KB)

/

## BET ripete en Litovio



En la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* aperis la unua informilo pri la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59), kiuj okazos inter la 5-a kaj 13-a de julio 2025 en Kaŭno (Litovio). Legu kaj aliĝu
https://sezonoj.ru/2024/07/bet-146/

## Brazila Muziko vesperumas

*Ĉiuj ni samas en ĉi vespero* (originale *Somos todos iguais nesta noite*), verkita de **Ivan Lins** kaj **Vitor Martins**. Kun video:

//ligo?

***Juna amiko* servos kaj utilos denove en 2025!**

## Universitato Espoir en Baraka, Kongo DR

***Kurso pri esperanto por komencantoj en la franca –niveloj A1-A2 kaj B1.***

La kurso okazos en la franca kaj komenciĝos la 15-an de septembro 2024. Estos tri grupoj en vacapo: plenaj komencantoj, mezaj komencantoj kaj progresantaj komencantoj. La instruado okazos per vacapo indvidue pere de sendo de lecionoj kun hejmtaskoj. La kurso estas senpaga. Entute estos 100 lecionoj kaj 10 testoj (skribaj ekzamenoj). Du voĉaj ekzamenoj okazos en februaro kaj julio kaj post tio ILEI transdonos ;a koncernajn atestilojn. Estos eble ricevi diplomon de la Universitato Espoir (UEC) de Baraka laŭ aparta interkonsento.

***UEC-lingvo-fakultato@groups.io***

Françoise NOIREAU (Fransoazo) en vacapo + 33 609 120 374 aŭ desirdapprendre@gmail.com'

## Ne nur elefantoj neniam forgesas

https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/la-memorkapablo-de-simioj-r443/

## Libroj el Svedio disponigeblaj

Danke al stipendio de fonduso mi povos sendi tute senkoste du-kilograman pakaĵon kun libroj, eldonitaj de Eldona Societo Esperanto en Svedio, al Esperanto-kluboj, urbaj bibliotekoj kaj al aktivaj esperantistoj, kiuj volas uzi la librojn por propagandi Esperanton. Se vi volas ricevi la librojn, bonvolu sendi al mi, Leif Nordenstorm, personan mesaĝon per mesaĝilo aŭ al leif.nordenstorm@gmail.com

Humphrey Tonkin

## Kurso por aziaj komencantoj

Jen kurso por azianoj por atingi la nivelon B2. Mi bezonas azianojn de Pakistano al Japanio, kiuj ne tiom bone parolas Esperanton. la kurso senpaga per *Zoom* komenciĝas la 25-an de septembro en horo taŭga por orienta azio. Aliĝu per mesaĝo al <kursaro.sekelj@esperanto.org>

Renato Corsetti

## Bambua estonto per plua pasio

Mia nomo estas Abraham Korir, kaj mi estas pasia pri bambuo kaj ĝia vasta potencialo por media konservado kaj ekonomia povigo. Nuntempe, mi administras bambuan infanvartejon kaj ankaŭ establis bambu-arbaron en mia bieno en Kenjo. Bambuo havas multajn aplikojn, de media konservado ĝis la produktado de diversaj aĵoj, kaj mi emas esplori ĉi tiujn eblojn plue.

Kiel junulo kaj esperantisto, mi engaĝiĝas uzi bambuon ne nur por persona uzo sed ankaŭ por krei komercajn ŝancojn. Mi kredas, ke per la ĝustaj iloj kaj subteno, mi povas produkti bambuajn varojn, kiuj povas profitigi la lokan komunumon kaj pretere. Mi kontaktas por esplori la eblon kunlabori kun vi en ĉi tiu klopodo. Via kompetenteco kaj ligoj povus esti valoregaj dum mi celas plivastigi ĉi tiun projekton. Mi precipe interesiĝas lerni de aliaj, kiuj estas engaĝitaj en simila laboro en diversaj

landoj kaj ŝatus ajnan gvidon aŭ ligojn, kiujn vi povus oferti.Se vi interesiĝas, mi ŝatus diskuti kiel ni povus kunlabori pri ĉi tiu projekto. Bambuo havas grandan promeson por kaj media konservado kaj ekonomia kresko, kaj mi kredas ke kune ni povas ricevii gravan efikon.

## Eŭropa Tago de Lingvoj kaj Paco

**Se vi loĝas en lando de EU**, atentu pri la iniciato de EEU, kiu kunmetis la mondan tagon de paco kun la apuda eŭropa tago de lingvoj, kaj dissendas al ĉiuj landaj asocioj en EU-landoj sian deklaron kaj sian version de la afiŝo pri la paco-tago.

**Se vi loĝas ĉie ekster EU**, bonvolu rigardi en https://esperantoporun.org/eo/internacia-tago-de-paco-2024/ kaj traduki la afiŝon, kiun vi trovas tie al via lingvo kaj sendi la tradukon al mi aŭ al unesperante@gmail.com. Bonvolu ankaŭ traduki al via lingvo la deklaron de UEA transdonotan al UN la 21-an de septembro kaj aldonitan al ĉi tiu mesaĝo . tiun materialon vi bonvolu uzi en informado al neesperantistoj individuoj kaj komunikiloj en via medio.

Renato Corsetti

========= vortoj: 1090 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)




La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj tridek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.